

Reeldono de historie signifaj verkoj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 434 1972.02.02 & 05

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Antaŭ kelkaj jaroj ni plendis, ke ne ekzistas reeldono de la gravaj libroj, kiuj ludis rolon en la disvolviĝo de la esperanta literaturo. Kiel arkivisto de esperanto-biblioteko ni konstante estis en kontakto kun verkoj, kiujn bedaŭrinde nur povis nekoni vasta publiko. Kaj ni plurfoje esprimis la timon, ke tiu manko de kontakto kun historiaj verkoj havas certan danĝeron.

A.- Nun tiu plendo ne plu valoras. Dum la pasintaj jaroj ekaperis reeldonoj de historiaj verkoj, tio ĉefe dank'al la dinamismo de du eldonejoj : la Eldonejo TK en Danlando kaj Reinhard Haupenthal en Germanio.

Cl.- Neniam tiuj reeldonaĵoj interesos vastan publikon. Pro tio ilia eldonnombro ne povas esti tre alta. Kompanse ilia prezo estas ege alta. Sed alta prezo estas nenio rilate al kompleta foresto.

A.- Jen tiuj dokumentoj nun rehaveblaj :

Cl.- Ĝus reaperis la romanoj *Viktimoj* kaj *Sur sanga tero* de Julio Baghy. Temas pri pli ol kvincent-paĝa libro fortike bindita, kiel estas ĉiuj libroj eldonitaj de TK. Prezo : 40 svisaj frankoj, kio estas alta sumo.

A.- Reinhard Haupenthal, kiu nun laboras al la reverkado de *Enciklopedio de Esperanto*, reeldonis serion da broŝuroj, sub formo de fotokopiaj reproduktaj :

Cl.- Tiel oni povas restudi verkojn de Zamenhof :

A.- La germana eldono de la *Unua Libro* (1887) kaj la *Granda vortaro germana-esperanto* (1894).

Cl.- De tradukoj de Grabowski estas ree haveblaj kvar tradukoj :

A.- De Puŝkin : *La neĝa blovado* (1888), de Goethe : *La gefratoj* (1889), de Prus : *La nova jaro* kaj de Sienkiewicz : *Janko-Muzikanto* (1891).

Cl.- Tiuj tradukoj, apud la verkoj de Zamenhof, ludis ege gravan rolon en la unuaj jaroj de la disvolviĝo de esperanto.

A.- Reinhard Haupenthal tute prave reeldonis verkojn pri gramatiko kaj vortfarado. Tiel oni povas restudi broŝurojn de René de Saussure :

Cl.- *Kia estas la logika signifo de l' vorto GRANDO ?* (1911) kaj *Fundamentaj reguloj de la vort-teorio de Esperanto* (1915).

A.- Tiuj du broŝuroj ludis gravan rolon, kiam la lingvo Ido ekdisvastiĝis konkurence al esperanto. Ili refutas la falsajn teoriojn de Louis Couturat. Bedaŭrinde ĝis nun ili ĉefe interesis fakulojn. Oni povas aserti, ke la aŭtoroj de la lernolibroj de esperanto ne multon scias pri la

argumentado de René de Saussure. Pro tio regas iuj nebulaĵoj en la gramatika kaj vortfarada instruadoj. Tute certe tiuj broŝuroj havos pozitivan influon.

Cl.- Pri la vortfarado ankaŭ aperis reeldono de historia verko de E. Wüster : *Die Verhältniswörter des Esperanto*, kiu povas multe utili al germanlingvanoj.

A.- Ni esperas, ke tiuj reeldonitaj verkoj naskos interesajn studojn. Kaj ni esperas, ke la eldonejoj TK kaj Reinhard Haupenthal daŭre liveros novajn fotokopiojn de historiaĵoj.

Cl.- Ĝis nun tiuj reeldonoj aperis sen enkondukaj studoj. Tio tute certe estas grava manko. Sed ties kaŭzon ni bone konas. Ne abundas la fakuloj, kiuj havas la sufiĉajn literaturajn konojn kaj la tempon por verki la atendatajn kritikajn antaŭvortojn.

A.- Eble la reeldono de historiaj verkoj vekos studemon ĉe esperanto-instruantoj, instigos diversaj societojn organizi stud-kunvenojn, favoros aperon en revuoj de kritikaj analizoj. Tiel formiĝos elito kapabla verki por estontaj reeldonoj kritikajn antaŭparolojn, kiuj nun mankas kaj malfavoras la vendon de tiuj arkivaj libroj al esperanto-studentoj.

Cl.- La Eldonejo TK aperigis, inter la du romanoj *Viktimoj* kaj *Sur sanga tero* de Julio Baghy, sub la titolo *Intervorto* tekston de Marjorie Boulton. Ĝin legante oni tuj konscias, ke Marjorie Boulton ne volis skribi analizon pri tiuj romanoj. Ŝi verŝajne tro bone konis Julion Baghy, kaj tute certe ŝi ne havis la necesan tempon por povi verki *intervorton*, kiu anoncas la deziratajn kritikajn studojn. Tion ni iomete bedaŭras.

A.- Siatempo SAT ne nur kontentiĝis eldoni la leterojn de Zamenhof. Dank'al la talento de Gaston Waringhien tiu libro aldone alportis al la esperanto-movado studon, kiu lumigis tutan periodon de nia movado. Similajn studojn ni atende gas.

Cl.- En diversaj esperanto-revuoj aperas sufiĉe interesaj kritikaj studoj. Tio pravas, ke tamen ekzistas aŭtoroj, kiuj povus verki por aliaj reeldonoj taŭgajn enkondukajn vortojn, kiuj faciligus la legadon de tiuj arkivaĵoj, donante klarigojn pri la tiamaj cirkonstancoj. Tiuj arkivaj verkoj iniciatis novajn vort-radikojn : estus interese koni ties liston, scii kial iuj radikoj sukcesis, dum aliaj ne. Vortkonstruoj arkaiĝis : oni devas atentigi la leganton pri ili. Kaj pri la aŭtoro, pri la tradukinto, pri la romano aŭ novelo mem oni ŝatus trovi informojn. Ni senpacience atendas similajn studojn, kiuj donus valoron al libroj, kiuj, sen tio, povas havi nur arkivan signifon.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!